# ?inio rifuzas novajn akuzojn de Usono




Beijing, apr 16 (RHK) La ?ina registaro rifuzis novajn akuzojn de la usona ?tatdepartemento, kiu informis pri realigo de eblaj nukleaj provoj sekretaj flanke de la azia lando.

La? raporto de la gazeto Russia Today, dokumento publikigita ?i-merkrede, sciigas ke ?inio havis altan nivelon de agadoj dum 2019 en sia provloko de nukleaj armiloj Lop Nur, en la nordorokcidento de la lando.

La dokumento citas la “eblan preparon” de ?inio por operacii Lop Nur dum la jaro, pri ties supozata uzo de  ?ambroj por bremsi eksplodojn, samkiel “vastajn aran?ojn” de elfosado en tiu loko.

La dokumento akuzas ?inion pri “manko de travideblo”, inkluzive de  supozata “blokado” de radioaktivaj kaj tertremaj datum-transmisioj el sentumiloj ligitaj al kontrolcento mastrumata de la Internacia Agentejo, kiu pravigas la plenumon de la traktato de kompleta malpermeso de nukleaj armiloj de 1996.

La menciita dokumento starigas “zorgojn” rilate la ali?on de Pekino al la normo de “nula rendimento” respektata de Usono, Britio kaj Francio en siaj provmoratorioj  de nukleaj armiloj.

Tamen, la koncerna dokumento ne prezentas ajnan pruvon pri la akuzo rilate al tio ke Pekino perfortas sian promeson plenumi la interkonsenton.

La anoncisto de la ?ina ministerio pri eksteraj rilatoj, Zhao Lijian, taksis la denuncojn kiel falsa?oj kaj sciigis ke ili ne meritas esti rifuzataj. Same, li klarigis al la gazetaro ke ?inio da?re plenumas aktive ?iujn kompromisojn pri la traktatoj de armilaj kontroloj.

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/internacionales/219960-cinio-rifuzas-novajn-akuzojn-de-usono

Radio Habana Cuba